

& Disputo de akvo kun vino:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 604 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis J. M. Dilherr. El germana en slovakon tradukis Daniel Sinapius-Horčíčka kaj el slovaka tradukis Eduard V. Tvarožek (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Olavo Rajdistrozo.>

(#Melodio:

<2,3:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o)

)×18)+

(& Strofoj:

<Akvo:>

'1 Se laŭ aĝo kaj merito

(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

iu volus en disputo

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!** ; /**Iru plankon, dancu kun /granda em'!**)

'2 saĝa vinon, akvon juĝi, vino certe devus fuĝi,

'3 ĉar antaŭ ol vin' aperis, Dio akvon jam preparis.

<Vino:>

'4 Se l' utilo kaj la forto estu l' bazo de l' raporto,

'5 pli ol akvo vino bonas: multajn ĝojojn ĝi ja donas,

'6 ĝi naskigas la gajecon, kreas dormon, amikecon.

'7 Tamen, diru, ĉu en vero kreski povus eĉ vinbero,

'8 se ne estus pluvo bona kaj malvarma ros' matena?

'9 Sen ĝi ne prosperus herbo kaj sekiĝus ĉiu arbo.

'10 Kiel sklavo sinjorinon akvo devas servi vinon.

'11 Ja ne havas pura akvo multe davivig-kapablo;

'12 bezonatas pli da forto por protekti kontraŭ morto.

'13 Kiu nur por akvo vervas, saĝon sian plen-konservas,

'14 sed por multaj tro da vino estis trista, aĉa fino:

'15 tro da vino, senrefute, prenas la prudenton tute.

'16 Kiu trinkas ĝin modere, tiun helpas vino vere -

'17 ne ŝveligas ĝi la ventron, donas al ni viv-kontenton.

'18 Ĉiu rajtas gaja esti, vivo-ĝojon manifesti.)